ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizajoj.
Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco" kaj „Revuo" (literatura, popolscienca).

Protektantoj:
D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M.Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gili Norta, komercisto, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, Bucureŝti
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-direktoro, Kaunas.

N-o 210
21. 9. 1924

Redakcio:
Ĉefredaktoro: *Teo Jung.*
Redaktoro: *Robert Kreuz.*
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj *M. Butin*, L. K.

Administracio:
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo
po numero egalvaloro de 0,06 dolaro aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto suferis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj landoj 0,05 dol. aŭ 0.25 sv. fk.

Anoncprezo
po kvadrat-centimetro egalvaloro de 0.20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0.15 sv. fk.), ea „Internacia Komerco" la duobla.

Antwerpen, Barcelona, Bucureŝti, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La Deksepa verŝajne en Svislando.

La Rejnmuzeo
en Koblenz (Germanujo).

Apartan lokon inter la diversaj muzeoj de la mondo pretendas la Rejnmuzeo en Koblenz. Fondita en 1912 de privata societo kun membroj diverslandaj, ĝi bone evoluiĝis sub la agema kaj afabla direktado de s-o D-o Vilhelmo Spies. — La muzeo montras la Rejnon laŭ kvar vidpunktoj: La naskiĝanta Rejno, Historia Rejnbildo, La romantika Rejno, La laboranta Rejno. —

Apud la Rejno, proksime al la bordpontoj de la pasaĝerŝipoj, vidiĝas domo, kun du beletaj frontonoj, kiu portas la surskribon „Rheinmuseum". Ni eniras kaj turnas nin al la ĉambrego maldekstre.

Tie (en la unua fako) ni rigardas per kartoj, reliefoj, pentrajoj kaj bildoj la naskiĝon de la Rejno kaj ĝia lando. Menciinda estas rilifeo pri la Rejnfalo kaj la Albula reliefo, ambaŭ tre ekzaktaj laborajoj, krome pentrajoj pri la Wiesbaden-a (visbadena) golfo (Rejno kajMajno) kun la tieaj bestaro kaj plantaro dum la glacia interepoko. Tre interesa estas bildo monfranta i. a. la nuntempan brunkarban ekspluaton apud Köln. Fotografajoj pri la lastaj grandaj superakvoj kaj pecetoj da Rejnoro plenigas la kolekton.

Inter la objektoj de la unua etaĝo (historio) ni admiras ĉarmajn imitajoĵn de antaŭhistoriaj fostokonstruajoj kaj de la ponto de Cezaro. Katedralaj kaj urbobildoj el la 16-a kaj 17-a jarcentoj allogas niajn rigardojn. Vere belega estas granda laŭnatura modelo de la urbeto Bacharach (Baharah) dum la jaro 1666. Murumita, kun turoj kaj pordegoj, kun ĉiuj dometoj, kiaj ili tiam ekzistis, ĝi staras en vitra kestego antaŭ la okuloj de la admiranta rigardanto. — Sekvas same bela unuopa modelo de la gardoturo „Pfalz" en la mezo de l' Rejno apud la urbeto Kaŭb kaj tia de la tipa gruo el Andernach (Andernah de l' jaro 1557).

En la dua etaĝo tute dekstre ni ekvidas apartmaniere aranĝitan, kvazaŭ naturan panoramon de Bingen-Ehrenfels, antaŭe la de la ŝipistoj iam multe timita „truo de Bingen", katarakta riverparto kun ŝtonegoj tra la tuta rivero, dekstre belega arbaro, malantaŭe la urbo Bingen kaj maldekstre inter rebejoj la kastelo Ehrenfels — Pejzaĝobildoj laŭlonge de la tuta Rejno kaj diversaj aliaj, mito kaj poezio, ornamas la murojn de l' hela ĉambrego. - Alia parto instruas nin pri vinkulturo.

Ekkoninte la romantikan Rejnon, ni nun vidas la riveron laboranta, t. e. portanta kaj parte movanta la valorajn ŝarĝojn konfiditajn al ĝi. Multaj belegaj modeloj de riverŝipoj de la unuaj ĝis la lastaj plej modernaj tipoj staras antaŭ ni; parte ili estas donacataj de la gravaj ŝiposocietoj. Apude murolarĝa havenbildo de la urboj Duisburg-Ruhrort montras la vastecon ka viglecon de nuntempa granda havenloko. Simila pentrajego pri la Rejnbordo apud Köln dediĉota de la urbo Köln, estas pretigata. —

La vizito al la muzeo, kiu okupas tri etaĝojn estas tre rekomendinda tiel al instruitoloj kiel al nefakuloj. Rilatante al la enhavo de la muzeo aperis du plaĉaj volumetoj (germanlingvaj, de D-o V. Spies), „La naskiĝanta Rejno" kaj „Historia Rejnbildo", al kiuj sekvos tria, „La laboranta Rejno". Ili estas interesaj por ĉiu, sed bedaŭrinde ne jam ekzistas iu traduko. La verkinto kaj direktoro de la Rejnmuzeo estas tre favora al Esperanto kaj intencas Esperantigi resumon de la tri libretoj. Ankaŭ gvidilo tra la muzeo estos presata en nia lingvo. — Tial ankaŭ por propaganda celo neniu samideano vizitanta la Rejnon kaj la urbon Koblenz forgesu rigardadi la interesan kolektaĵaron, kiun la anoj de la Internacia Rejna Karavano 1925 certe havas ankoraŭ en bona memoro.

Leono Funken, Koblenz

Socia vivo.
Francujo kaj la okhora konvencio.

La franca ministro de laboro, s-o Godard, prezentis al la deputitaro leĝprojekton por la konfirmo de la projekto deko nvencio limiganta la laborhorojn en industriaj entreprenoj al ok po tago kaj kvardekok po semajno, projekton de konvencio balotitan de la Internacia Labora Konferenco en Washington en 1919.

Bildoj el la historia pratempo de l' Rejno.



Vulkanoj je la meza Rejno.

Oni rememoros, ke leĝprojekto kun la sama celo estas jam prezentita al la brita deputitaro.

* * *

Internacia malpliiĝo de la vivkosto.

La plialtiĝo de prezoj, kiu okazis en la plimulto de la landoj ĉirkaŭ la fino de lasta jaro kaj la komenco de 1924, estas ĝenerale anstataŭigita de malgranda sed konstanta malpliiĝo.

Laŭ la oficialaj ciferoj, eldonitaj en la Internacia Labora Revuo, la sola lando, en kiu grava pliiĝo de vivkostoj okazis, estas Hungarujo.

La „golfo de Wiesbaden".

Ankaŭ en Germanujo okazis malgranda pliiĝo, kiu ampleksas ĉiujn kategoriojn de elspezoj, kun escepto de brulaĵoj kaj lumigado.

Informservo de la Internacia Labora Oficejo.

Scienco.
Astrologio.

Ĉe saltrovejo, lokita en distrikto de Aĉinsk (Eniseja gubernio, sude de siberia fervojo), 10 aŭgusto falis meteoro. Ĝi havis aspekton de granda fajroglobo kaj eksplodis kanonbrue.

M. Krjukov, Irkutsk.

* * *

Biologio.
Evoluo de seksoj.

Oni konas la eksperimentojn faritajn en Wien de Prof. Przybam, kiu sukcese interŝanĝas la kapojn de raŭpoj kaj greitas al ratoj la okulojn de alia besteto. Jen ankoraŭ pli kuriozaj rezulto pri sama temo estas okaze komunikitaj al Scienca Akademio en Paris, kaj promesas ardajn sciencajn pridiskutojn.

Do juna biologo, s-o Jacques Benoît, kaptis leghorn-kokidinon 26-tagan kaj fortrančis la ovarion. Post tri monatoj ĝi jam prezentis signojn certajn de virseksiĝo, kaj je la sesa monato ĝi havis tiel ruĝan kaj grandan kreston kiel koko, t. e. kresto 77 mm longa kontraŭ 29 mm por kokinoj de sama kovitaro. Oni povus kredi, ke ĉi tiu metamosfozo estas nur pri ŝajna eksterajo, sed jen venas la mirindajo.

S-o Benoit, skrupula kaj sciencista observanto, ne kontentiĝis pro tiu nura konstato. Li faris novan operacion por rigardi internen al sia klientino, kaj ekvidis, ke nova organo estis kreskinta spontane ĉe la loko de la forigita ovario. Scienculo estas ja scivolema homo, li do refoje detrančis la novan elkreskitaĵon por ĝin esplori ĝisfunde. Mi ne povas tie ĉi, en porpopola artikoleto, sekvi la akademian raportinton en liaj detaloj pro troa teknikeco kaj komplikeco; tamen jen estas la kruda fakto: la nova organo montris ĉiujn intimajn apartajn karakterizojn de la virseksaj organoj[1]). Estas do certe, ke la kokino estis ektransformiĝanta je koko. — Ne finite! Nia kokino, senigite de sia nova organo, reprenis iom post iom la eksterajn karakterojn de sia origina sekso; la kresto baldaŭ kuntiriĝis, blankiĝis kaj preskaŭ forneniiĝis.

La sekvon ni ankoraŭ ne konas, sed s-o Benoit promesis doni antaŭ nelonge novajn sciigojn. Ni atendu. Estas ja tro strangaj kaj spirit-konfuzantaj aferoj, por ke mi provas diri konkludon kaj fari ian komenton.

A. Esselin, Nancy.

[1]) Teknika noto. — La semogenesaj tubetoj entenas ĉiujn elementojn de la sperma generoserio; la ĉeloj de Sertoli, la spermogonioj kaj spermocioj ŝainas laŭnormal, sed la nombremultaj spermidoj prezentas evoluon sentipan, kaj la plimultaj el iliaj kernoj montras sensspecifikecon (piknozon). Tamen en kelkaj kubetoj, apud kernoj, oni trovas facile rekonebiajn spermocoojn, kvankam iliaj kapoj ŝainas haltigitaj en sia natura disvolviĝo. Dume elmontriĝas, ke la spermogenerado ekkomencas normale, sed estas poste konfuzata en sia evoluado, ĉar ĝi finvenas nur al malnormalaj produktoj.

Pacifismo.
23. Universala Packongreso.

De 2—7 oktobro okazos en Berlino en la palaco de la Respublika Ekonomia Konsilantaro la 23. Universala packongreso, kunvokita de la Internacia Ligo de pacifistaj societoj en Bern. Ĝi estas aranĝata de la Germana Pacifista Kartelo kaj la ĉeforganizajoj de la germanaj pacifistaj unuiĝoj. La 5 oktobro okazos en la parlamento (Reichstag) solena malfermo. Postan tagon komenciĝos la plenkunsidoj, en kiuj oni pritraktas la jenajn temojn: „Internacia malarmiĝado", pri kiu parolos nter alie altrangaj militistoj de Usono, Anglujo, Francujo kaj Germanujo. Grafo D-o Coudenhove-Kalergi, la aŭtoro de la libro „Paneŭropo kaj la Ligo de Nacioj" (La manifesto estas havebla en Esperanto) pri la temo de sia libro. Araj delegacioj anonciĝis el la tuta mondo.

Dum la kongreso ankaŭ esperantistoj-pacifistoj faros demonstracion por Esperanto. Oficiala delegito ĉeestos

Detalojn sendas laŭ peto la oficejo de l' kongreso: 23. Weltfriedenskongreß, Zimmerstraße 87, Berlin S. W. 68. (Koresponĉado kun eksterlando en Esperanto).

Kulturo.

Latina alfabeto ĉe la turkmenoj.

Antaŭnelonge en ET estis presita malgranda artikoleto, informanta pri enkonduko de latina alfabeto, anstataŭ la malnova araba alfabeto inter transkaŭkazaj turkmenoj (Baku-Tiflis).

Estas konate, ke la sankta libro de mahometanoj „Korano“ estis kaj estas presata ĉiam en araba lingvo kaj per araba alfabeto. Tial tiu ĉi alfabeto fariĝis deviga alfabeto de ĉiuj mahometanoj kaj en ĉiuj landoj kaj popoloj, kiuj konfesas la mahometan religion. Duaflanke estas ankaŭ konate, ke araba alfabeto estas tre komplikita; ĝi havas 29 literojn kiuj ŝanĝas sian formon dependе de sia loko en la vorto kaj krom tio kuniĝas inter si aŭ englutas unuj la aliajn; grandegan rolon ludas ankaŭ diversaj superliteraj signoj. Kompreneble, tiu ĉi alfabeto estas tre malfacile ellernebla kaj ĝenerale tre malfaciligas la legoscion ĉe ĉiuj mahometanoj.

Pri tio jam delonge aperis inter mahometanoj provoj plisimpligi tiun ĉi alfabeton, sed tiuj ĉi provoj ordinare suferis fiaskon*), ĉar la araba alfabeto estis kvazaŭ sankta kaj kiu parolis kontraŭ ĝi, tiu kvazaŭ parolis kontraŭ la mahometa religio mem. Sed la sana popola prudento faradis sian aferon kaj jam antaŭ ĉirkaŭ 70 jaroj famekonata kaŭkaza turkmena dramverkisto M. F. Ahundzade en Tiflis ekstariĝis kun fervora propagando de latina alfabeto anstataŭ la araba. Cetere lia provo ne havis praktikajn rezultatojn kaj nur la lasta revolucio en Rusujo lasis al kaŭkazaj turkmenoj (tataroj el kaŭkaza Azerbajĝano-Baku kaj apudaj regionoj) eblon praktike efektivigi la diritan reformon. Tiun faris precipe S. A. Agamalioglı kiu estas nun Prezidanto de la Plenumanta Komitato de la Unuiĝo de Transkaŭkazaj Sovetaj Respublikoj (Kartvelio, Azerbajĝano, Armenio), kaj N. Nerinanof, unu el ĉefuloj de la Tutrusa Unuiĝo de Sovetaj Respublikoj. Ankoraŭ en 1917 jaro ambaŭ nomitaj eminentuloj komencis energian propagandon de la reformo kaj post kelkjara laborado ili vere efektivigis ĝin. En 1922 jaro en Baku aperis unua turkmena latina alfabeto, unua libro por legado (kun komparaj tekstoj en latina kaj araba alfabetoj) kaj unua turkmena gazeto presata per latinaj literoj. Cetere, kiel estas videbla el la turkmena latina alfabeto, en ĝin estas enkondukitaj iuj literoj kun iom ŝanĝita formo, ĉar nombro de la pure latinaj literoj montriĝis nesufiĉa por transdono de ĉiuj sonoj de la turkmena lingvo . . .

Per doni al legantoj de ET ideon pri grandega rolo de tiu ĉi reformo eĉ el la pure ekstera vidpunkto kaj por alproksimigo de la turkmena kaj la ĝeneraleŭropa kulturoj, ni represigas tie ĉi du tekstojn de la turkmena versajo, presita dekstre per arabaj literoj kaj maldekstre per novaj latinaj literoj. Esperanta traduko de tiu ĉi versajo estas ankaŭ aldonita.

Por propagando de tiu ĉi gravega reformo, kiu devas multe faciligi klerigadon de la turkmena junularo, estas fonditaj du specialaj komitatoj unu en Tiflis kaj la dua en Baku eldonantaj du gazetojn, lernlibrojn ktp.

La ambaŭ komitatoj ne kontentiĝas nur je kaŭkaza teritorio: la reformo estas direktata en Rusujon, en Turkujon, en Persujon ktp., kie estas turkmenoj. Kaj ĉie ĝi renkontas fervorajn subtenantojn.

En Turkujo la Nacia Kunveno en Angora opinias, ke ankoraŭ ne estas ĝustatempe konfirmi postulon de iuj membroj de la Kunveno pri anstataŭigo de la araba alfabeto per la latina. Sed la reformemuloj enkondukas la reformon per privata vojo. La plej grava konstantinopola jurnalo „Tanin“ ĉiutage presas parton de sia materialo per latinaj literoj. La turkaj partianoj de la latina alfabeto**) estas konvinkitaj, ke baldaŭ tuta Turkujo, — kun la Nacia Kunveno je sia kapo — aliĝos al ilia reformo.

En Persujo la reformo enradikiĝas precipe en pli progresema nord-okcidenta parto de la lando, t. e. en persa Azerbajĝano, kun urbo Tabrizo antaŭ ĉio. La reformon gvidas precipe la jurnalo „Ĥakimied-Millie („Potenco de l' Popolo“).

Ne estas dubinde, ke tiu ĉi reformo grave helpos al la plibonigo de l' klero de turkmena popolo.

Pro tio estas dezirinde, ke ĉiuj Esperantistoj diskonigu la informon en la gazetaro kaj speciale inter koncernaj kolonioj de turkmenoj ktp. Pri ĉiuj paŝoj informu en Esperanto la „Komitato de la Nova Turkmena Alfabeto“, Paskeviča ulica 3, Tiflis (Georgio).

A. P. Andrejev,
Nikolajevskaja 56, Tiflis.

*) Estis akceptataj nur malgrandaj ŝanĝoj; la esenco do restis senŝanĝa de la tempo de Mahometo.

**) Ilia ĉefo estas Gussejn-Ĝahid, famekonata publikigisto, redaktoro de „Tanin“.

Akcepto de la latina alfabeto per la Baŝkira respubliko.

La tatar-baŝkiraj agantoj unuanime decidis enkonduki latinan alfabeton. Estas fondita Regiona Komitato de l' latinistoj de Baŝkira Respubliko.

Oni komisiis al komitato eldoni latinan alfabeton, organizi rondetojn de studantoj latinajn literojn, kaj agiti pri akcepto per loka gazetaro.

A. Avdeev, Kazanj.

Radio.

Represo en nacilingvaj radio-gazetoj nepre rekomendata!

Ĉiumonataj Esp. paroladoj en Moskva.

Radio-paroladoj en Esperanto estas aranĝataj akurate ĉiam la lastan tagon de ĉiu monato je 14,30 h. laŭ meza eŭropa tempo. Ondlongeco 3200 metroj.

IƷLK JOLA VARALŁM.	ایشیق یوله وارالم!	Ni iru luman vojon.
Ezit sezim,	ایشیت سوزوم،	Aŭskultu mian proponon,
ArkadaƷlım, maralım!	آرقاداشم، مارالم:	Mia kamarado, mia kolombeto!
Karanlıkdan —	قارانقدن —	El maliumo
lƷlk jola varalım.	ایشیق یوله وارالم.	Ni eliru sur la luman vojon,
Zəlalətdən	ضلالتدن	De turmentoj
Kyrtaralım,çıkalım:	قورتارالم چیقالم:	Ni liberiĝu, ni foriru:
By jollarda —	بو یوللارده	Sur tiu ĉi vojo —
Çok səfalar qerunur.	چوق صفالر گورونر!	Nin atendas multe da feliĉo.

Latina alfabeto ĉe turkmenoj (turko-tataroj).

La 31. 5. 24 en Moskva radio-stacio de Komintern s-o M. Valentinov faris radio-paroladon pri la atingitaj rezultoj pere de la lastjaraj radiotelefonaj paroladoj en Esperanto. En multaj gazetoj aperis favoraj artikoloj kaj rimarkoj pri la parolado.

La 7. kaj 15. 6. 24 sama samideano faris per radio-telefono klarigojn pri la programoj de radio-koncertoj. *Sovetlanda Esperanto-Servo.*

Germanujo.
Frankfurt a. M.

Ni siatempe informis, ke la radio-stacio de Frankfurt malgraŭ klopodoj de la idistoj decidis akcepti en la sendo-programo nur kurson de Esperanto.

La direktoro de la stacio petis nin, nun publikigi la jenan sciigon en nia gazeto:

Okaze de la enkonduko de Esperanto-kurso la sendostacio de Frankfurt ricevis tian amason da aprobaj deklaroj de esperantistoj el ĉiuj partoj de Germanlando kaj el la eksterlando (Svedujo, Norvegujo, Rumanujo, Portugalujo, ktp.) ke pro teknikaj kaŭzoj la respondo estas tute ne ebla. La Sudokcidentgermana Rondradia A. S. (Südwestdeutsche Rundfunkdienst A. G.) pro tio petas bonvole afable akcepti tiun ĉi noton kiel respondon kaj dankon.

Subskr.: *D-o Flesch.*

La XVII. Mondkongreso verŝajne en Svislando.

Kiel konate, ne alvenis dum la Deksesa invito por la Deksepa. D-o Privat nun sciigas en „Esperanto“ (aŭgusto-septembro), ke la svisaj samideanoj serioze konsideras la okazigon de l' XVII a en Svislando, verŝajne en Genève kun posta restado sur la montoj apud la Lemana lago.

Tiu informo sendube kontentigos ĉiujn, kiuj estas konvinkitaj pri la neceseco de ĉiujara grandskala Esperanto-demonstracio.

Jam en Bern okaze de la IX a la svisaj samideanoj pruvis sian organizan talenton. Ni ne dubas, ke kongreso en Genève estos sambone organizata. Ni ankaŭ estas certaj pri tio, ke bela Svislando allogos multajn samideanojn, tiel ke la XVII a superos ĉiujn antaŭajn kongresojn rilate la nombron de kongresanoj.

Grava korporacio por Esperanto.

La Internacia Kooperativa Konferenco okazinta de l' 25—30 aŭgusto en Gent (Gand) Belgujo akceptis du favorajn decidojn por Esperanto, kiujn ni publikigas ĉi-sube:

I. „La Internacia Kooperativa Konferenco kunveninta en Gent, Belgujo, sentante la bezonon je internacia lingvo kiel reciproka interkomprenilo kaj dezirante fariĝi tempo-kaj monperdon pro traduko de ĉiuj paroladoj en diversajn lingvojn, decidas klopodi enigi Esperanton en la popolajn lernejojn en ĉiuj nacioj.“

II. „La Konferenco komisias la Internacian Kooperativan Virinan Komitaton esplori kiamaniere fondi Esperantan Kooperativan Gazeton kaj fari proponon tiurilate al la sekvonta kunveno de la Internacia Kooperativa Virina Gildo.“

J. Is

Renovigo de ministra dekreto por Esperanto en Hungarujo.

Per ministra ordono n-o 71 972/1924. V. ü. o. la hungara ministerio por religio kaj instruado denove eldonis la ordonon, kiu permesas la senpagan Esperanto-instruadon en la ŝtataj hungaraj mezlernejoj dum du horoj semajne por instruistoj kaj lernantoj pere instruantoj de la Hungarlanda Esp. Societo. Bedaŭrinde en multaj lokoj ne ankoraŭ estas instruantoj.

La granda anoncentrepreno

Rudolf Mosse en Berlin por Esperanto.

La publikigo de l' konata libro de Fr. Nitti „Eŭropo ĉe la Abismo“ per subentrepreno de la granda germana komercgazeto „Frankfurter Zeitung“ jam pruvis la intereson de la grandgazetaro por Esperanto. Ni jus sciiĝis, ke alia gazetara entrepreno germana simpatias kun ni. La granda anoncentrepreno Rudolf Mosse en Berlin, posedanto de aro da germanaj gazetoj decidis definitive uzi kaj propagandi Esperanton. Pere de siaj diversaj jurnaloj ĝi anoncas la de ĝi faratan vendadon de propagando-paketoj, enhavantaj instrumaterialon kaj informilojn pri Esperanto. En sia ĉefa jurnalo „Berliner Tageblatt“ ĝi dum tiuj tagoj publikigos lecionaron pri Esperanto sur tuta pago dufoje dum ĉiu semajno. Estas nedubeble, ke la subteno per tia grava entrepreno estas grandega helpo al la movado en Germanlando. Ni gratulas la sukceshavintajn aranĝantojn de tiu ĉi afero.

Nuligo de instrudekreto por Ido.

Antaŭ duona jaro la ido-informiloj diskonigis dekreton de la komisariejo por popolinstruado en Suhum de la socialista sovet-respubliko Abĥazio favora por Ido. Ni nun sciiĝis de la eksteraro de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo en Moskva, ke la instrudekreto „pro ne-informiteco“ estas nuligita de la komisariejo.

Jarkunveno de la Svisa Esperanta Societo en Biel-Bienne.

La jara kunveno de S.E.S. okazos dimanĉon 28 septembro 1924 en Hôtel Bielerhof en Biel (Bienne). Por faciligi al ĉiuj la vojaĝon al Biel, la centra komitato decidis okazigi la tutan aranĝon samtage kaj samloke, evitante tiamaniere la hotelkostojn.

1-a laborkunsido je la 10½ h. en Hôtel Bielerhof,
Komuna tagmanĝo je la 13 a h. po fr. 4 „ „ „
2-a laborkunsido je la 15 a h. „ „ „

Tagordo:

1. Protokolo de ta antaŭa jara kunveno,
2. Raporto de la Centra Komitato,
3. Raporto de la kasistino kaj kaskontrolantoj,
4. Elekto de la prezidanto kaj ĉefgrupo,
5. Elekto de la loko por la venonta jara kunveno,
6. Fikso de la kotizo por la venonta jaro,
7. Projekto de XVII a Universala Kongreso de Esperanto en Svislando,
8. Projekto pri Esperanto kaj Radio,
9. Individuaj proponoj.

Ĉiuj delegitoj aŭ partoprenontoj bonvolu sin enskribigi nepre antaŭ la 20 septembro ĉe la sekretariino, f-lino Diekmann, Rue de Lyon, 66 Genève dirante samtempe ĉu ili partoprenos la komunan tagmanĝon.

La grupoj bonvolu ankaŭ sendi por la sama dato resuman jarraporton.

La personoj, kiuj deziras fari ekzamenon, bonvolu sin turni rekte al la prezidanto de Ekzamena Komitato, s-o Stroële, Maujobia, 7, Neuchâtel.

La tuta svisa samideanaro estas treege petata, partopreni multnombre tiun gravan kunvenon.

Protokolo

de Kunveno de Internacia Radio-Asocio dum Deksesa.

Ĉeestis la kunvenon 14 membroj de la Asocio kaj 72 aliaj Esperantistoj. S-o Ing. Isbrücker prezidas.

La prezidanto klarigas la neĉeeston de la prezidanto de la Asocio, D-o Pierre Corret, kaj de la sekretario s-o Harry A. Epton, kaj petas s-on Edmonds legi raporton de la Estraro kiun ili intencas tuj dissendi kiel la duan bultenon. La kunveno aplaŭde akceptas la raporton, kiu pritraktas inter alie la elekton de Naciaj Sekretarioj.

La prezidanto demandas ĉu la ĉeestantoj povas fari proponojn pri Naciaj Sekretarioj por landoj ĝis nun nereprezentataj en la listo. Oni faras kelkajn proponojn kiujn s-o Edmonds promesis transponi al la Estraro por prikonsidero.

La prezidanto klarigas la ideojn de la Estraro rilate al la starigo de regularo, nome, ke la

membroj kunvenu en Paris dum Pasko 1925 kaj ke oni tie entreprenu la aferon. Tiun aranĝon oni aprobas kaj sekve de alvoko farata de la prezidanto pri ebleco de ĉeesto en tia kunveno montriĝas ke 8 ĉeestantaj membroj povos veturi al Paris tiucele.

D-o Privat altiras atenton al necesa laboro farota pri propagando ĉe la Radio-Kluboj, kaj s-o Edmonds klarigas kion jam faras la Brita Esperantista Asocio en tiu flanko.

La redaktoro de la gazeto „Radio-Welt" anoncas, ke li estas preta meti sian gazeton je la dispono de membroj de la Internacia Radio-Asocio por anoncoj kaj por diskutado de interesaj temoj.

S-o Balkanyi raportas kun dankoj pri helpo kiun li ricevis de la sekretario de la Asocio por Hungara Radio-gazeto.

D-o Privat faras mallongan anoncon pri la proponata Esperanta dissenda stacio, kaj laŭ peto de la prezidanto poste detale resumas la planon. Ĉiuj stacioj ĝis nun apartenas al registaroj, armeoj, aŭ privataj societoj, kaj kvankam kelkaj stacioj dissendas en Esperanto de tempo al tempo, ili ne konstante interesiĝas pri ĝi. Ni devas havi nian propran stacion, kio ne estas multe kosta afero por nia granda movado. Por akceptebla sumo ni povus havi grandan stacion similan al „Radiola" aŭ „Chelasford" kaj de tiu ni povos dissendi tage kaj nokte. Radio stacio por mallongaj ondoj kiel ekzemple 240 en Londono kostus malpli, sed per tia stacio oni povus dissendi eksterlanden nur dum la nokto. Tiu parto de la afero estas teknika, sed tion ni povas esplori kaj rilate al ĝi ricevi grandan helpon de nia spertulo en la fako s-o Ing. Isbrücker. Post la jam farita anonco promesoj venis ĝis jam preskaŭ £ 1500. Per ne tre granda peno ni certe povas duobligi tiun sumon, ĉar multaj deziras sin reteni ĝis ili vidos kiel la afero marŝos.

Kiam ni havas promesojn ĝis la bezonata sumo, ni devas ekzameni ĉiun projekton, kaj elektinte la plej taŭgan projekton, ni devas submeti la detalojn al ĉiu promesinto kaj poste fondi akcian kompanion. La stacio havus sufiĉan enspezon ĉar en diversaj landoj la registaro donas al ĉiu stacio parton de la impostoj je aparatoj. La stacio povas ankaŭ pagigi ĉu firmaojn ĉu societojn por la utiligo, dissendante iliajn anoncojn, raportojn ktp. dum difinitaj horoj. La elspezoj estos malgrandaj kaj espereble oni povos pagi procenton almenaŭ post iom da tempo al la akciuloj.

Prof. Christaller proponas, ke grupoj Esperantistaj aĉetu akciojn.

D-o Privat aprobas la ideon, kaj rimarkigas, ke la senda stacio donos novan viglecon kaj novan spiritojn al kunvenoj de lokaj grupoj. Ĉiu grupo povas ricevi bonan ricev-aparaton per kiu la membroj en la kunvenoj povas aŭskulti al unu parolado post alia de bonaj Esperantistoj. Plue oni povas starigi kursojn pri Esperanto en la nacia lingvo, kaj utiligi la paroladojn dissenditajn por instrui la lernantojn. Oni eĉ povas antaŭvidi kurson sen profesoro, kiam unu persono havas laŭtparolilon kaj eble 10 sekvas la lecionon. Plej lerta afero eble estus ne nur poroli en Esperanto, sed dissendi ekzemple raportojn de la Ligo de Nacioj, vetero, ktp., en angla, franca, germana lingvoj, ktp. kun poste frazoj en Esperanto. Tiel ĉiu povos konstati la fakton kiun ni jam spertis dum la radio konferenco en Genève, nome, ke Esperanto estas la plej taŭga lingvo por radio. Estas atentinde, ke la „oj" kaj „aj" estas bone aŭdeblaj, kaj oni kredeble trovos, ke Esperanto venkos per la elparolado kaj ne per la skribado. Poste okazas ĝenerala diskuto pri diversaj punktoj inter f-lino Nickel, D-o Privat, kaj s-oj Pitlik, Merchant, Kousek, kaj Sznycer.

La prezidanto proponas sendi saluton al D-o Corret kaj s-o Epton kaj dankon por tio kion ili faris rilate al Esperanto kaj Radio kaj precipe rilate al Internacia Radio-Asocio. Tiun proponon la kunveno aplaŭde akceptas, kaj s-o Emonds promesas transdoni la esprimojn.

Charles H. Edmonds,
Protokolinto.

Esperantista Literatura Asocio.

Kunsidoj dum la Deksesa.

Unua kunsido la 11-an 8. 1924, 40 ĉeestantoj, malfermo je 8½a matene.

Prezidantino, f-lino Zschepank, salutas la ĉeestantojn kaj malproksimen ankaŭ la forestantajn membrojn. Ŝi memorigas la lastan E. L. A. kunsidon en Bern antaŭ dekunu jaroj, gviditan de la antaŭa prezidantino s-ino Hankel, kiu sendas al la kunvenintoj korajn salutojn.

Ŝi akcentas la rolon de Wien kiel urbo de muziko kaj literaturo. Kiel urbo de literaturo ĝi estas speciale simpatia al E. Literatura Asocio. Majstroj verkadis ĉi tie, ankaŭ la popola verkisto F. Raimund, kies „Malŝparulo" la kongreso prezentas. La tradukinto, la altŝatata s-o kolonelo Zwach, estas membro de E. L. A.

La tagordo estas legata:

1. Jara raporto.
2. Kaso-raporto.
3. Nova fikso de enirpago kaj kotizo.
4. Priparolado de jenaj demandoj:

a) Kiajn librojn ni aperigu por vere riĉigi nian literaturon.
b) Tradukado de Esperanto-verkoj nacilingven (referato s-o Jean Forge Fethke, Danzig).
c) Pri la prezidanteco de E. L. A.
d) Kontrolado kaj rekomendo de manuskriptoj, kaj ebla pago por kontrolo.
e) Ĉu traduko devas esti laŭvorta kaj laŭstila, aŭ ĉu ĝi estu libera laŭ stilo de l' tradukanto (dezirespримo f-lino Ireland, Brighton).
f) Pri la obeemo de la Esperantaj verkistoj al la Lingva Komitato (propono s-o Wiesenfeld-Warszawa).
g) Pri la problemoj kaj vojoj de la Esperanto-scienco estonta (referato s-o Illing, Wien).
h) E. L. A. raportu pri „Literatura Mondo" kaj akceptu oficialajn rilatojn kun ĝi kiel sola esperanta literatura kaj arta gazeto (dezirespримo s-o Balkányi, Budapest).

P. legas la jaran raporton, el kiu montriĝas, ke E. L. A. malgraŭ la nefacilaj cirkonstancoj dum la pasintaj jaroj laueble laboris. Kelkaj novaperintaj verkoj estas citataj.

Laŭ propono de s-o Wiesenfeld la aŭtoro de „La reĝo Judea" trad. de Devjatnin povas esti malkaŝata, ĉar en Ruslando ĝi estas konata, nome princo Konstantin Romanov, parenco de la caro.

La kaso-raporto evidentigas, ke la enspezoj ne daŭre kovros la elspezojn. Traktinte punkton 3an de la tagordo, oni fiksas aliĝ-pagon da 2 gm markoj kaj jaran kotizon da 2 gm markoj.

Je punkto 4c f-lino Zschepank raportas, ke s-ino Hankel, konsiderante la esencon de E. L. A. kiel tiun de libera unuiĝo, transdonis al ŝi la prezidantecon, sed ke ĝi nun estu disponata al la kunsidantoj. Oni laŭdezire elektu prezidanton.

S-o Wiesenfeld proponas konsenton al la ago de s-ino Hankel, kaj f-lino Z. estas elektata prezidantino.

S-ino Hankel, ankaŭ laŭ propono de s-o Wiesenfeld, estas elektata honora prezidantino. Oni decidas, telegrame tion al ŝi sciigi.

S-o von Medem parolas pri la temo: Kiajn librojn ni aperigu . . . Li akcentas, ke multekostaj verkoj ne estas aĉetataj nuntempe, ke tial prefere ni tradiku malmultampleksajn verkojn kaj laŭeble interkonsentu antaŭe kun eldonistoj.

Pro manko de tempo oni prokrastas la diskuton pri tiu temo ĝis dua kunsido. Fino je la 10 h.

Dua kunsido la 12an 8., matene je 8½a.

Prez. malfermas, raportante, ke saluttelegramo al s-ino Hankel estas forsendita, kaj legante al la kunvenintoj ĝian tekston, kiu estas aprobata. Oni daŭrigas la diskuton de la unua kunsido.

Prof. Christaller proponas, ke por tradukado oni elektu la premiitajn verkojn de la diversaj landoj.

Prof. Erošenko (blinda samideano) faras la saman proponon, aldonante ke aperigo de klasikaj verkoj estas tre grava por malgrandaj ŝtatoj, ĉar en iliajn lingvojn oni nur malofte tradukas klasikajn verkojn de grandaj nacioj. Esperanto estas la ilo, konatigi ilin al malgrandaj nacioj.

S-o von Medem varme subtenas ĉi tiun proponon.

Oni interkonsentas, sekvi la faritajn proponojn, sed traduki krom tio pli novajn verkojn.

Koncerne punkton 4d de la tagordo la kunsidantoj decidas, ke la ŝanĝproponoj faritaj de kontrolintoj estu akceptataj de verkintoj aŭ tradukintoj, ke, antaŭ ol rekomendi verkon, E. L. A. aranĝu finkontrolon, kaj ke la kontrolo de manuskriptoj de nun estu pagata, ĉar la nunaj vivkondiĉoj plejparte ne permesas honorofican laboron.

S-o Fethke faras sian referaton pri: Tradukado de Esp.-verkoj nacilingven. En sia raporto li proponas novan vojon ĝis nun neiritan, tradukadon de Esp.-verkoj en naciajn lingvojn. La sukceso konvinkos eble ĉiun pri la taŭgeco de Esp. Por povi traduki el Esp. nacilingven, estas necese, posedi originalajn verkojn. Oni verku originale! E. L. A. kontrolu originalajn verkojn, ĝi peru inter verkisto kaj tradukonto en nacian lingvon. La verko „Abismoj", kies aŭtoro estas s-o F., estas tradukita en kvar aŭ kvin naciajn lingvojn. Jen provu por la efektivigebleco de la propono de s-o F.

S-o Wiesenfeld, tuŝante la temon multe diskutitan en ĝeneralaj kunsidoj: la timo je disrompiĝo de nia lingvo en dialektojn —, proponas akcepti jenan rezolucion: E. L. A. senkondiĉe obeu la decidojn de la Lingva Komitato, kiuj ajn ili estu. La rezolucio unuanime estas akceptata.

Propono de s-o Balkanyi, ke E. L. A. raportu pri „Literatura Mondo" kaj akceptu oficialajn rilatojn kun ĝi kiel sola esperantista literatura kaj arta gazeto, alvokante la E. L. A.-verkistojn al kunlaboro kaj la Esp.-legantojn al abono kaj disvastigo de la gazeto, estas akceptata.

Oni decidas, ke tria kunsido okazu la 13. 8. Fino de la hodiaŭa kunsido je la 10½-a.

Tria kunsido la 13. 8. 24, je la 3 posttagmeze.

Prezidas f-lino Zschepank, atentiganta pri du punktoj de la tagordo ankoraŭ priparolotaj.

F-lino Ireland, Brighton, aludas la temon: Ĉu traduko devas esti laŭvorta kaj laŭstila, aŭ ĉu ĝi estu libera laŭ stilo de la tradukanto. Ŝi opinias necesa, konservi la stilon de la aŭtoro.

Prezidantino diskutigas la temon.

Prof. Christanell rekomendas, konservi la karakteron de la originalo. Oni obeu la tezon: en verko ĝenerala skribu simple, per ordinara vortordo kaj facile komprenebla stilo. En verko scienca oni povas apliki maloftajn vortojn kaj terminojn kaj eĉ stilon ne tuj komprenebla (? Red.) por ĉiu leganto. Ĉiam oni skribu nepre internacie!

F-lino Ireland kaj s-o Illing aprobas la ideojn de la paroladinto kaj akcentas, ke oni ne malhelpu la verkistojn per obstinaj reguloj. Oni akcelu artan evoluon de la lingvo.

Prez. resumas la ideojn aŭditajn, konstatante ke unuflanke ni klopodu konservi la karakterizan stilon de la originalo. Aliflanke ni klopodu internaciigi la stilon de la tradukaĵo, kio estas nur ebla, se ni detale studadas kaj pense penetras en la originalon. Ni anstataŭigu naciismojn ne sufiĉe kompreneblajn per alia bildo, konata kaj uzata en Esperanto. Poemojn ni prefere traduku „libere", t. e. ni redonu la ideon enhavon, konservante la karakteron de la formo originala.

S-o F. W. Illing parolas pri „Esperanto-scienco en estonteco". Esperanto estas ne nur ilo de sciencoj, sed mem objekto de scienco. Pro la arta ekzisto de Esperanto la historio nedisputeble decidos, ĉu Esperanto efektive estas lingvo. Tial s-o Illing preferas originalojn al tradukoj. En ili la lingvo evoluos. Speciala esperanta temo estas: „La interna ideo, internaciismo kaj esperantismo". (Parenteza rimarkigo: oni diferencigu inter esperantistoj kaj esperantismanoj.) Niaj travivaĵoj animaj, idealaj eble evoluigos stilon aparte Esperantan, kiu influos ankaŭ nacilingvajn verkojn. Eĉ por neesperantistoj la vortaro, la historio de la lingvo, bibliografio, historio de Zamenhof ktp. estas esplorindajoj. S-o I. ne estas optimisto kredanta, ke eble jam morgaŭ estiĝos esperantologio kun aparta scienca gazeto. Tamen li opinias, ke per korespondado inter la E. L. A.-anoj oni sukcesos trovi personojn konintajn D-on Z., sciantajn parton de la Esp.-historio k. c., eĉ se ili ne estas esperantistoj. Oni trovu riĉulojn, por finance subteni tiun projekton. Oni ja devos presigi la rezultatojn de tia enketo por vivigi esperantologion.

Prof. Christanell rimarkigas, ke la scienco ne estu distrančata. Oni ja povas nun kolekti la faritajojn antaŭajn. E. L. A. aperigu artikoletojn pri la temo ĵus aludita, por ke la adresoj de ĉiuj, sciantaj ion pri la pratempo de esperantismo, kiel eble plej baldaŭ estu konataj. Jam estas urĝa tempo!

Oni fine tuŝas la demandon de lernolibro, kaj Prof. Christanell proponas verki lernolibron en Esperanto laŭ la moderna metodo de Merten. Prezidantino dankante al ĉiuj fermas la kunsidon je la 4¼ h. *Johanna Zschepank,* Prezidantino.

Sudokcidentgermana Esperanto Ligo (S.O.L.).

Kunveno en Frankfurt a. M. 12. 10. 24.

La 12 oktobro la Esperanto-kartelo de Frankfurt a. M.-Offenbach festos la 20 jaran revenon de l' fondigo de la loka grupo de Frankfurt a. M. Je la sama tago matene je la 10 h. okazos en Restoracio Kyffhäuser, Kaiserstr. 62 (2 minutojn de l' ĉefstacidomo) kunveno de S.O.L. por priparoli la nunan situacion. Grupoj el la teritorio de S.O.L. estas kore petataj delegi almenaŭ unu personon por partopreno. Ĉeesto de aktivaj samideanoj el la teritorio estas nepre dezirata. Nemultekosta tagmanĝo estos havebla. Posttagmeze ĉiuj partoprenontoj ĉeestos la jubileon de la loka grupo.

Partoprenontoj anoncu sin tuj al la ĝisnuna sekretario de S.O.L. s-o Carl Barthel, Woehlerstrasse 14, Frankfurt a. Main.

Lingva Komitato.

Post kiam antaŭ kelka tempo la prezidanto de la L.K. s-o Prof. Cart grave malsaniĝis kaj nur antaŭ ne longe resaniĝis, ni ĵus ricevis la malĝojigan informon, ke la tre aktiva ano de la L.K. s-o Prof. Grosjean-Maupin subite malsaniĝis grave sekve de sangalfluo. Kune kun la tuta samideanaro ni esperas, ke s-o Prof. Grosjean-Maupin baldaŭ resaniĝu por povi denove dediĉi siajn grandan forton kaj laboremon al nia movado.

Negocaj informoj.

Enciklopedia vortaro de Wüster.

Post ofta reklamado de la enciklopedia vortaro de Wüster per la eldonistoj Hirt & Sohn, Leipzig tre prave kaj trafe oni atentigis al ĉi-tiu grandioza verko ankaŭ en la kongreso en Wien.

Ankaŭ ni sentas denove la devon atentigi pri tiu grava verko, unika ĝis nun en la Esperanto-Literaturo. Ĉiu konscia esperantisto devus posedi la jam aperintan unuan volumon, kies prezo estas tre modera, konsiderante la faktan valoron de tia ellaborajo.

La eldonistoj jus informis nin, ke la dua volumo aperos plej baldaŭ.

La apero de la aliaj volumoj kompreneble dependas de la mendoj. Pro tio konsciaj esperantistoj nepre devos tuj mendi la jam aperintan kaj la ankoraŭ aperontan duan volumojn.

En la nuna perjodo de l' praktikado de Esperanto oni ne povas esti sen tia bonega informilo.

Adreso de la eldonejo estas: Hirt & Sohn, Esperanto-fako, Salomonstrasse 15, Leipzig.

Pacifistoj kaj Instruad-reformuloj atentu!

De la 2 ĝis la 7 de oktobro 1924 okaziĝos en Berlin

la 23. mond-pac-kongreso

de la internacia unuiĝo de la pac-societoj, kaj inter ĝiaj aranĝoj

internacia historio-kunveno

aranĝota de la ligo por instruadreformuloj.

Certe ankaŭ esperantistoj intencas partopreni en tiuj ĉi kongresoj kaj ni petas tiujn gesamideanojn anonci sian partoprenon ĝustatempe al s-o Direktoro J. Glück, Berlin W. 35, Potsdamerstr. 113, Haus V, kaj skribi pro invitiloj por ambaŭ aranĝoj al „Deutsches Friedenskartell, Berlin SW. 68, Zimmerstr. 87 IV.

Ni intencas aranĝi en tiu ĉi kongreso ankaŭ oficialan referaton por Esperanto kaj invitas ĉiujn interesitojn al kunveno, ĵaŭdon la 2 oktobro vespere je la 8 h. en kafejo Josty, por priparoli la demandon.

Mardon la 7 oktobro vespere je la 8 h. okaziĝos en kafejo Josty, Potsdamer Platz sengĉena kunveno, al kiu ni invitas ĉiujn en- kaj eksterlandajn esperantistajn gastojn. *H. Nickel.*

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novajo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Eŭropo.

Francujo.

Esperanto oficejo en Perpignan. S-o René Liech, ĉefsekretario de „Amika Rondo" informas la esperantistaro ke li estas je la dispono de ĉiuj geesperantistoj trapasantaj Perpignan por ĉiu dezirata, informo; li instalis je 500 metroj de la stacidomo, en la bela domo de la lernejo „Pigier", Esperanto-oficejon (Telefono 620). Afiŝo kun grandaj literoj (Esperanto) avertas la pasantojn.

Perpignan. „Amika Rondo" malfermos kurson por la junuloj la 7. oktobro kaj por la junulinoj la 10. 10. La gazetaro anoncas tiun malfermon. La arta sekcio de „Amika Rondo" preparas por oktobro propagandan vesperon.

Germanujo.

Annaberg-Bachholz. Pro translokiĝo de la ĝisnuna grupestro s-o Meynig al Leipzig oni elektis kiel novan prez. s-on instruiston Krämer. Nova kurso komenciĝos en oktobro.

Esperanto Gruparo Berlin. Okaze de la ĉeesto de tra Berlin veturintaj gekongresanoj kiuj aligis al la bonege aranĝita karavano de s-o Blankenheim, gruparo Berlin aranĝis la 4 aŭgusto en kafejo Josty sengĉenan salutvesperon. Inter la multnombra ĉeestintaro troviĝis gastoj el Danujo, Svedujo Anglujo kaj el diversaj nordgermanaj urboj. S-o Blankenheim salutis la ĉeestantojn kaj donis la lastajn informojn pri la kongreskaravano al Wien. Parolis plue s-o patentadvokato Schiff, honora prezidanto de la gruparo kaj s-o Wallon, la „Senior" de la germana movado. La tuta ĉeestintaro estis fotografita.

La 5. 8., matene je la 8a la karavano ekvojaĝis al Wien. Partoprenis 65 personoj. Pro la zorgemo kaj lerteco de s-o Blankenheim ĉio estis bonege aranĝita por tiu ĉi multnombra karavano kaj ni ŝuldas grandan dankon al la karavanestro.

La 19. 8. okazis la monata kunveno, en kiu kelkaj jam revenintaj kongresanoj, i. a. s-oj. Blankenheim, Stulik ktp. raportis pri la XVIa. Pliaj rekontoj pri kongres- kaj postkongresaranĝoj faris en la konversacia vespero la 2an de septembro f-lino Nickel, s-oj Glück, Markuse kaj Hitrov. Ĉeestis inter la gastoj s-o Pankraŭ el Bromberg kiu interese parolis pri polaj esperanto-aferoj. *H. N.*

Bremen. Vendreda Klubo Bremen estis fondata laŭ ekzemplo de la Vendr. Kl. Leipzig la 6 sept. de la Prez. s-o Heino Heitmüller. Laborvesperoj: ĉiun 2. kaj 4. lundon de l' monato.

Kaiserslautern. La 7. 9. kunvenis tie gesamideanoj el Kaiserslautern, St. Ingbert, Saarbrücken, Kreuznach kaj Wiesbaden kun la celo interamikigi la najbarajn grupojn. S-o Omlor faris paroladon pri praktikaj sukcesoj kaj aplikadoj de Esperanto. Krome raportis div. samideanoj pri la loka movado kaj pri la Deksesa. Sekvis amuza parto kun bela programo. La kunveno certe atingis la deziritan celon. (Rekomenda agado. Red.)

Kirchweyhe b. Bremen. Je la 16a de julio estis fondata loka grupo d. G. E. A. Prez. s-o Lankenau; 21 membroj.

Grekujo.

Ateno. La esperantistoj vigle propagandas. En la gazeto „Eŭdotheros dogos" aperis noto pri Esperanto-traduko de Nitti-libro. La ĵurnalo „Ethnos" (La popolo) publikigis tutkolonan artikolon pri la kongreso de Wien. Espereble baldaŭ restariĝos en Ateno la antaŭmilita grupo.

Hispanujo.

Nova Esperantista Grupo en Sa1ler (Mallorca). Post mallongaj preparaj laboroj, la 15 aŭgusto stariĝis la Esperantista Grupo „Salleric" kaj elektis la jenan Direktantan Komitaton. Prez. s-o Miguel Arbona Oliver, vicprez. s-o Jaime Bestard Cánaves, sekr. s-o Miguel Serra Pastor, vicsekr. s-o Bartolome Coll Ozonas, kas. s-o Jaime Coll Arbona, bibl. s-o Andres Cauellas Muntaver, kunsidantoj f-lino Franciska Pizá Castauer f-lino Francisca Pizá Bennazar.

La 17. 8. sama monato, solene oni malfermis la unuan kurson de Esperanto, kiu estis ĉeestata de multaj personoj. Prezidis la urbestro kaj ĉeestis multnombraj reprezentantaroj de la Esperantista Klubo Palma. S-o Barceló, Delegito de U. E. A. en Palma, lingvo internacia Esperanto kaj s-o Aloman, kaj Colom.

Polujo.

Warszawa. La fakto, ke oni elektis Warszawan kiel Centron de la Internacia Studenta Esperanto-Asocio tre interesigis la Varsovian Studentaron. La redakcio de Studenta gazeto „Trybuna Akademicka" petis Akademian Esperantistan Rondon alsendi por enpreso la detalan raporton pri studenta fakkunsido dum la Deksesa. La elekto de Centra Estraro de I. S. E. A. okazos cirkaŭ 15. X.

Rusujo.

Eltirita el Oficiala Bulteno de „SEU" julio 1924.

Sebastopol. En la honoran komitaton de la Sovetlanda Esperanta Unuiĝo eniris Prof. Ŝĉerbak, direktoro de la Klinika Instituto en Sebastopol.

Tver La gazeto „Tverskaja Pravda" represigas novaĵojn el „Esp. Triumfonta".

Esperanto en Lernejoj.

Warszawa. Komencante de kuranta lernjaro Esperanto estas endukita kiel deviga lernobjekto en Gimnaziaj Kursoj de s-o Sekulowicz, Warszawa, Zórawia 42.

St. Folman.

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiaj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin tiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaŭgajn artikolojn.

Pri „Danmarko".

En kelkaj okazoj (ekzemple en organo de UEA) mi renkontis la vorton „Danmarko" por Danujo aŭ Danlando. Antaŭe UEA uzis Danio, kiel ĝi ja principe aplikis preskaŭ eksklusive la finiĝojn „io" por landnomoj. Se la formoj kun „io" nur en kelkaj kazoj pro internacieco estas akceptindaj, „Danmarko" ŝajnas al mi tute ne tolerinda. Oni rakontis al mi, ke oni en la diskuto de l' Deksesa respondis oficiale de UEA, ke „Danmarko" estas internacia formo. Tio ne estas vera, ĉar multaj lingvoj havas tute alian formon. La rusa lingvo ekzemple diras „Danja" = Danio. Tio kio estas franca, angla, itala, germana kaj dana ne nepre estas internacia. Anoj de aliaj lingvoj devas lerni la novan vorton. Tio forigas la facilecon, ke ili nun povas simple formi la vorton per „Dan-" ujo aŭ -lando.

Marcel Dupuis, Mons.

Rim. de la Red. S-o Dupuis estas prava, sed ne pro la fakto, ke „Danmarko" eble nur apartenas al 6 aŭ 7 lingvoj kaj pro tio ne estas nepre internacia, sed pro principa demando pri uzo de voriradikoj. Ĉu Danoj estonte estas „Danmarkanoj"? Kaj ĉu por Britujo oni ne samrajte povus uzi „Britanio", ĉar en kelkaj lingvoj ekzistas la radiko „Britan"? Sendube ne, ĉar la apliko de tiu principo kaŭzus haoson endangerigantan la lingvo-unuecon. Ne ĉio estas rajtigebla per § 15 de l' Fundamento, sage konsiderata pro serioza principo, ne pro persona prefero. *R. Kr.*

Ĉu „Esperantisto" aŭ „Esperantano"?

Ankoraŭ en 1897 jaro en nia dua*) gazeto „Lingvo Internacia", eldonita tiam en Svedujo (Upsala) Jen kion skribis s-o Louis de Beaufront, kiu estis ĝis 1907 plej fervora defendanto de Esperanto kaj nur en 1907 jaro elstariĝis kun sia Ido.

„S-o Mock, **) konsiderante Esperanton kiel specon de partio, trovas, ke „esperantano" estas pli gusta ol „esperantisto". Li eraras, sed mi devas konfesi, ke mi helpis al lia eraro, akceptinte tiun opinion, sen sufiĉa pripenso, kiam li ĝin esprimis al mi. Esence kaj antaŭ ĉio Esperanto estas lingvo: tial ni ne povas diri „esperantano", tute same kiel ni ne povas diris „lingvano" por nomi la homon, kiu speciale okupas sin je lingvoj (la lingviston).

La intima senco de „ano" estas: „membro de" . . . La intima senco de „isto" estas: „kiu sin okupas speciale je . . . kiu pli malpli faras el ia arto, scienco aŭ metio sian ĉefan okupadon, la grandan aferon de sia vivo, unuvorte sian profesion". Kiel oni vidas, la konsidero de l' moro ne devas gvidi pri tiu ĉi punkto, sed nur la konsidero de ordinara, kutima, speciala okupado je . . . Se estas vere, ke la metio kunportas ideon de gajo per moro, estas ne malpli vere, ke la profesio ne kunportas la saman ideon. Ĉu ni pensas pri gajno aŭ profito, kiam ni nomas iun muzikisto, artisto, leĝisto, predikisto, lingvisto, misiisto?

Konklude, ni ne povas preni „esperantano", ĉar ni ne diras „lingvano, propagandano, muzikano" ktp. Sed ni devas konservi „esperantisto" kiel „propagandisto, muzikisto" ktp., ĉar oni tre bone komprenas, ke esperantisto estas homo, kiu okupas sin je Esperanto, kiu ĝin profesias, por tiel diri, analogie al la muziko, al la arto, al la lingvoj ktp. (Rigardu la gazeton „Lingvo Internacia" 1897, p. 148.)

Ŝajnas, ke tiuj ĉi rezonadoj estas tute konvinkantaj. Aliflanke nia majstro ĉiam parolis kaj skribis „Esperantisto", kaj neniam „Esperantano".

A. P. Andrejev, Tiflis, Georgio.

*) La unua nia gazeto estis „La Esperantisto", eldonita ĝis 1896 en Nürnberg.

**) Unu el plej malnovaj spertegaj esperantistoj, verkisto, propagandisto ktp.

271. Hokkruco, Svastiko.

En kelkaj politikaj artikoloj en Esperanto mi legis la vorton „Hokkruco". Kion ĝi signifas? Ĉu estas la speco de Kruco?

K. Kroita, Singapore.

Respondo de la redakcio. La vorto „Hokkruco" estas germanismo, erare uzita. Temas pri la signo „Svastiko" kun respektivaj vortoj en angla, franca, itala, hispana kaj rusa lingvoj. „Svastiko" estas sankta signo de hindoj, kiu konsistas el kruco kun egalaj brankoj, kies kvar ekstremajoj estas kurbigitaj laŭ formo de gamo. De post proksimume 1880 ĝi estas uzata en Germanujo kiel insigno de antisemidoj, de kelka tempo ankaŭ de politikaj unuiĝoj pangermanaj. Pro tio oni nomas la membrojn „Svastikanoj", (germ. Hakenkreuzler). *R. Kr.*

Kio estas S.A.T.

S.A.T. estas organizajo celanta meti Esp. je la servo de la proletaro tutmonda

S.A.T. estas peresperanta aparato neniel politika

S.A.T. kvankam utilcela, laboristoserva, estas samtempe altideala: ĝi celas krei ĉe siaj membroj sennacieecan spiritostaton.

Kiajn organojn havas S.A.T. por plenumi tian taskon?

S.A.T. eldonas por plenumi tian taskon monatan revuon, ilustritan kun literatur-scienca aldono:

„Sennacieca Revuo"

(Redakcio: 24 Bould. Beaumarchais, Paris XI; Administracio Colmstr. 1,III, Leipzig-Stött., Germanujo)

S.A.T. eldonas per sia Eldonkooperativo gravajn verkojn el kiuj „Faŭsto" de Goethe kaj „Eklumo en Abismon" de H. Barbusse estas jam aperintaj

S.A.T. eldonas Jarlibron, entenanta la adresojn de sia membraro, statistikojn pri la laborista movado en la mondo kaj plej diversajn sciindajojn.

Kion jam faris S.A.T.?

S.A.T. okazigis 3 kongresojn, kies lasta estis honore prezidata de la fama scienculo A. Einstein

S.A.T. vekis ĉe la esp. laboristaro grandan intereson, veran entuziasmon kaj per tio certigas la sukceson de Esp. en proletaj rondoj.

S.A.T. estas leĝe enregistrita en Francujo. Detalojn oni petu skribante al la sidejo. Adreso: Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris XX.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, flanĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage.

Aliaj anoncetoj, nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas por proprai anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.— mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikiĝo.

ORGENISTOJ. Mi petas poŝtkarton kun bildo de via orgeno, volonte kun priskribo. Mi resendos senprokraste tiun, kiun mi ludas. C. M. Vissers, orgenisto, Klundert (N. Br.), Nederlando. [2

VINOJN GERMANAJN KAJ EKSTERLANDAJN vendas L. Weinschenk, Zollhafen, Mainz, Germanlando. Oni postulu ofertojn. Reprezentantoj estas serĉataj. [2

VI POVAS PERLABORI! 25% diskrete, ludfacile. Oportuna neĝena, solida afero. Ne pluajn kostojn. — Detalajoj 1 sv. fr. aŭ egalvaloro. — S-ino Louis Seiß, Regensburg (Bayern) Prebrunn-Allee 5. [2

BONAN RABATON. Mi deziras, vendi 55 il. libroj de Thora Goldsmidt al firmao aŭ persono, kiu povas pagi tuj post la ricevo. Adreso: Delegito Magda Mammen, Grenaa, Danujo. [2

La „Rondeto de Esp-istoj en Bobruisk" amike petas ĉiujn Esp-istojn, kiujn interesas Esperanto-movado en Rusujo, por helpi organizi la ekspozicion, sendi objektojn, kiuj estas interligitaj kun Esperanto. Sendajoin direktu al: s-o Johano Gajdukievič, Lukskaja str. 12., Bobruisk, Ruslando aŭ al Sussi Valkovskaja, Socialističeskaja str. 198. [2

LITOVAJ SAMIDEANOJ. Kiu scias pri la sorto de Wacław Legowicz, loĝinta iam en Taŝkent, bonvolu sciigi al lia onklo laŭ adreso: Al Wicenty Bogdan, Kafanova 48 Taŝkent (Turkestano). [2

POLAJ SAMIDEANOJ. Kiu scias pri Antoni Piekarski, loĝinta ĝis mondmilito en Warszawa, bonvolu sciigi al lia nevo Ludwik Škutto, Kafanova 46, Taŝkent (Turkestano). [2

EDZIĜO. S-o Ary Zamora en Porto Alegre (Brazilio) edziĝis kun f-lino Aracy M. Evangelista je la 30 julio 1924. [2

MORTO. La 27. 7. 24 mortis la antaŭ ne longe naskinta filulino Zofija de gepatroj Kovalevski en Taŝkent (Turkestano). (Ni kondolencas. Redakcio de ET.) [2

NASKIĜO. Al gepatroj Johano Gladkov en Uljanovsk (Ruslando) naskiĝis la 16 de aŭgusto filineto, nomita „Lilio". [2

NASKIĜON de idino „Roswitha" (Rozo blanka) anoncas ĝojoplene instruisto Krämer, Annaberg-Erzg. (Ni gratulas, Red.) [1

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Letervesperon aranĝos la duan de oktobro Laborista Esperanto-Societo en Lwow (Polujo). Adreso de sekretario: Rudolf Dvorak, Lwow-Zamarstynow, Ogrodnicka 685, Polujo. [2

S-o Hans Löbel, Turnerstr. 25, Glauchau (Sa.), Germanujo, deziras korespondi per il. PK kaj L, ŝanĝi post interkonsento musikaĵojn, iel sukcesintajn. [2

Societo anonima Canninga & de Koster, Acaciastraat 176, s' Gravenhage. Nederlando deziras korespondi kun la tuta mondo kaj ŝanĝas PM, PK il., gazetojn, sportjurnalojn, fotojn ktp. [2

S-o Antonio Balacz, Telegrafa Centro, Sta. Clara, Kubo, Antiloj, deziras interŝanĝi il. PK kaj L kun gesamideanoj de Svislando, Grekujo, Turkujo, Danujo, Portugalujo, Svedujo kaj ekstereŭropanoj. Mi ĉiam respondos. [2

S-o Oskar Flad, Darmstädterldstr. 81, Frankfurt a. Main-Süd p. k. & L. kun ĉiuj landoj, speciale kun libristoj kaj eldonistoj. Respondas nepre!

3 junaj Esperantistoj, s-o Poulsen, ĉe Helleman Nielsen, s-o Olaf Jensen, ĉe redaktoro Jensen, s-o B. Baden, 24 jara skolto, ĉe Messen, ĉiuj en Grenaa, Danujo deziras korespondi per interesaj PK aŭ L. Por la tuja respondo garantias la Delegito de Grenaa. [2

S-o Giuseppe Giolla, Via Fabio Fibzi 50, Milano XXXI., Italujo, deziras interŝangon de poŝtmarkoj kaj papermono, poŝtkartoj (se eble poserie) artaj revuoj kaj libroj. Nepre frue respondas al ĉiuj. [2

S-o Karlo Schnabl, Grossarl (lando Salzburg), Aŭstrio, vera Esp-isto, deziras korespondi per il. PK kun la tuta mondo. [2

S-ino V. Hidassy, Csónak utca 15, Budapest II, Hungarujo, deziras korespondi kun inteligentaj gesamideanoj, escepte ĉehoj [2

S-o Jozefo Lakrzewski, str. Vilenska 41-21, Warszawa, Polujo, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo per il. PK kaj L. pri diversaj temoj. [2

S-o Vinco Uždavinys, juna f-lo, ul. Wielka 12-1, Wilno, Polujo, volas korespondadi kun samideanoj (precipe kun fraulinoj) pri la literaturo, geografio, vivo de l' lernantoj, pedagogiko kaj interŝangas PK kaj vidaĵoj. [2

Ĉiuj malsanoj, ĝuste kaj ĝustatempe batalitaj, kuracigas. Detalajoj kun provosendaĵo por diversaj malsanoj 2 ormarkoj aŭ egalvaloro. S-ino Louis Seiß, Prebunnallee 5/0, Regensburg (Germanujo). [2

S-o Josef Hrabě, inspektoro, Palackého 61, Praha-Vinohrady, Ĉehoslovakio interŝangas PM kun tuta mondo. Respondos al ĉiuj kaj ĉiam senprokraste. [2

Lasilege deviga tekato germanlingva: Verlag und Druck (Eldonejo kaj Presejo): T. & H. Jung, Horrem bei Köln. Verantwortliche Schriftleiter (Respondecaj Redaktoroj): Teo Jung kaj Rob. Kreuz, Horrem b. Köln.

Dubrovnik (Ragusa).

Ne fidu al ekstera brilo! — La perlo de Dalmacio. — Trompistoj. — La ducent kolombetoj de la Gundulić-placo. — Belaj viroj kaj virinoj. — Idiliaj stratetoj. — Fortikaĵoj. — Ŝtonoj. — Melankolia sento.

Kiel arogante staras tiu hotelo apud la haveno, kiel fanfaronan nomon ĝi portas, — kaj kiel turmente estis pasigi la nokton en ĝi! Oni devus averti ĉiun vojaĝanton viziti tian hotelon, oni devus meti je piloro la nomoj de iliaj posedantoj, kiuj tiel malmulte zorgas pri sana dormo de siaj gastoj. Ekzistas sufiĉe da puraj hoteloj, t. e. hoteloj seninsektaj, ankaŭ en Dalmacio, kaj oni rajtas kredi, ke — kio estas ebla en unu hotelo, nome pureco — ankaŭ estas ebla en ĉiu alia.

Kompreneble la sekvintan matenon mi tuj transloĝiĝis, eĉ al simpla hotelo, kiu estas sencima kaj kiu tamen ne tie fanfaronas; ĝia nomo estas „Hôtel de la Ville". Mi rekomendas ĝin plezure al la samideanoj vizitontaj Dalmacion. Cetere ĝi troviĝas meze en la urbo kaj estas eĉ pro tio preferinda. Al kiu ĝi eble estas tro simpla, tiu prenu ĉambron en unuaranga hotelo „Imperial".

— Kvar tagojn mi nun vivis en tiu perlo de Dalmacia marbordo. Hodiaŭ estas sabato. Mi sidas sur benko sur la ferdeko de l' „Zagreb", jam bona konato de mi, por veturi al Kotor. La tempon de la veturado mi volas uzi por skribi kelkajn liniojn pri Dubrovnik kaj mia restado tie.

Mi anticipu: la urbeto plaĉas al mi tiel bone, ke mi decidis resti en ĝi ankoraŭ kelkajn tagojn, kaj poste transversi Adriatikon por iri Italujon.

La veturado al Kotor estas nur unutaga ekskurso kaj hodiaŭ vespere mi revenos al Dubrovnik. Mia intenco estis viziti ankaŭ Cetinje — tiun nestor, kiu estis la restadejo de Nikita, reĝo de malgranda sed fiera popolo de montenegranoj.

Oni anoncas en Dubrovnik, ke oni povas veturi de Dubrovnik al Cetinje kaj returne por 300 dinaroj. Sed tiu anonco ŝajnas esti trompo. La veturigisto diras, ke oni pagas 400 dinarojn de Kotor al Cetinje kaj returne; sed de Dubrovnik ĝis Cetinje kaj returne li postulas 2500—3000 dinarojn. Ĉe ni oni enkarcerigus tiajn trompistojn aŭ devigus ilin veturigi la turistojn por la anoncita prezo. Pagi 2500 aŭ 3000 dinarojn por unutaga ekskurso mi ne emas. Tial mi preferis ekskursi per ŝipo nur ĝis Kotor, ĉar la ŝipveturado estas relative malmultekosta, kaj hodiaŭ mi ĝuas sur la ŝipo ankoraŭ rabaton de 50% por duaklasa bileto.

— En Dubrovnik mi jam eksentas min iel hejme. Nun, kiam mi ne bezonas plu timi la cimojn, kiam mi jam konas la „fontojn", la taŭgajn restoraciojn kaj kafejojn, kaj kiam mi alkutimiĝis al la karaktero de la lando kaj de la loĝantaro, mi dezirus restadi ankoraŭ kelkajn semajnojn.

Estas tiel idilia, kiam mi ellitiĝas, rigardi el mia fenestro en la dua etaĝo kaj vidi la viglan vivon sur la Gundulić-placo sub mi. Tie staras la viroj kaj virinoj en siaj originalaj naciaj kostumoj apud la standoj kaj vendas vinberojn, figojn, melonojn kaj aliajn dolĉajn fruktojn. La plej dikaj kaj plej dolĉaj vinberoj ja kostas nur 4—5 dinarojn po kilogramo! Kaj posttagmeze, kiam la foirado ĉesis, ĉirkaŭflugas ducento da grize-blankaj kolombetoj la monumenton de Gundulić, eĉ ture ne ĝenas sin eksidi sur la honorinda kapo de l' glora poeto aŭ sur la kornico de mia fenestro.

Idilia estas ankaŭ la vivo de la loĝantaro, almenaŭ ĝi ŝajnas esti tia al la fremdulo. Oni povas imagi, ke la prilaboro de la tero estas tre malfacila. Ekzistas preskaŭ nur montoj kaj ŝtonoj, kaj sur la deklivoj oni devas konstrui fortikajn murojn por protekti eĉ malmulte da tero kontraŭ la ventoj blovantaj desupre. Sed la vivo en la urbetoj kaj sur la akvo ne povas esti tro malfacila. La loĝantoj de Dalmacio povus eĉ pli facile vivi, se ili sukcesus altiri amason da fremduloj al sia lando; ĝi certe valoras esti vizitata kaj admirata. Kompreneble oni devus zorgi pri nepra pureco en ĉiuj hoteloj, pri pli bona interkomunikado, pri pli granda varieco de manĝaĵoj ktp.

La homoj ĝenerale estas simpatiaj kaj afablaj, ne de tia kelkfoje troigata ĝentileco, kian oni spertis ekz. en Wien, sed de simpla afableco. Preskaŭ ĉiuj aspektas sanaj, brunigitaj de la suno kaj fortaj. Ankaŭ virinoj havas grandparte altan staturon, bonan figuron kaj belan, kvankam iom akratrajtan vizaĝon; sed ekzistas ankaŭ tre graciaj, delikatvizaĝaj fraŭlinoj. Plej bone oni povas tion konstati en la banejoj apud la marbordo en Split kaj Dubrovnik. Tie oni trovas kelkajn niksinojn de admirinda beleco kaj fleksebleco, kiuj devas ravi ĉiun viran koron.

Ofte, vagante tra la stratetoj de Dubrovnik — tiel mallarĝaj kaj malhelaj kiel kelkaj stratetoj en la plej malnova parto de Köln, kiujn oni preskaŭ timas trapasi —, oni estas frapata de la subita apero de belaj knabinaj figuroj. Ili venas el iu kaŝita pordeto kaj iras gracie kaj facilmove sian vojon, rideton sur la ruĝaj lipoj; la kapeto kun la densa nigra hararo balanciĝas facile.

Ĉi tie oni ne bezonas timi trapasi la stratetojn. Estas eĉ tre interese vagadi tra ili. Escepte la pli larĝan ĉefan straton — la „Stradone" aŭ „Placa Kralja Petra" —, la tuta antikva parto de Dubrovnik havas nur tiajn mallarĝajn stratetojn. Eĉ kelkaj novaj partoj de l' urbeto havas similajn.

Ordinare la stratetoj estas nur 2—3 metrojn larĝaj. Ili estas aŭ paralelaj al la „Stradone" aŭ transversas ĝin kaj ĝiajn paralelstratetojn; la transversaj stratetoj konsistas plejparte el unu sola granda ŝtuparo. Ĉar tiel estas konstruita Dubrovnik, ke la „Stradone" kuŝas profunde, kaj la urbeto altiĝas ambaŭflanke de ĝi.

Precipe interese estas vespere, kiam oni, venante ekzemple de monto Srgj, sur kiu Napoléon konstruigis citadelon, eniras la urbeto tra pordego kaj rigardas tra unu el la fendosimilaj transversaj stratetoj malsupren. Oni vidas la lumojn profunde antaŭ si kaj imagas, ke oni falos en abismon. Centritdek aŭ pli da ŝtupoj kondukas malsupren.

La antikva parto de la urbeto estas ĉirkaŭita de tre dikaj muroj kun fortikaj turoj kaj bastionoj. Je unu flanko tiuj muroj kaj bastionoj staras sur rokoj rekte apud la maro. Oni komprenas, ke en pasintaj tempoj tiuj fortikaĵoj estis nekonkereblaj. Dubrovnik-Ragusa estis la sola urbo apud Adriatiko, kiu sukcesis ĝis la napoleonaj tempoj gardi sian sendependecon. Pri tio la Dubrovnikanoj tre fieris kaj fieras ankoraŭ nun.

La fortikaj muroj eĉ rezistis al tertremo, kiu detruis la urbon antaŭ ĉ. du jarcentoj.

Pro danĝero de tertremoj aŭ terskuoj la domoj ankaŭ staras preskaŭ ĉiuj izolite. Preskaŭ ĉie inter po du domoj troviĝas strateto; sed pro la mallarĝeco de la stratetoj la arkitektura fermiteco per tio ne suferas.

Pro la multego da stratetoj la urbeto estus ideala kaŝejo por krimuloj. Sed al mi ŝajnas, ke la loĝantaro pensas pri ĉio pli multe ol pri krimoj; ekzistas escepte, kompreneble, sed ili estas malofte. Laŭ la diro de ĉi-tieuloj en Montenegro estas malsame: tie ekzistas multaj rabistaj bandoj, kiuj trovas bonegajn kaŝejojn en la sovaĝa montegaro.

La novaj urbopartoj de Dubrovnik troviĝas ekster la muregoj kaj etendiĝas ĝis Gruž, kiu apartenas al la komunumo. Tuta Dubrovnik, inkluzive Gruž, havas laŭdire ĉ. 15000 loĝantojn, la duonon de Split, kiu havas 30 000 kaj pro tio nun estas la plej granda urbo apud Adriatiko.

La domoj en Dubrovnik estas tre forte konstruitaj el ŝtonoj, la plimulto eĉ havas ŝtonajn plankojn. Same ĉiuj stratetoj estas kovritaj per ŝtonaj kaheloj kaj tial tre puraj.

Entute ŝtonoj estas ĉi tie oftegaj, la tuta regiono estas ŝtona. Multaj piedvojoj estas tial nur malfacile ireblaj; ĉar oni jetas ŝtonetojn sur ili sed ne teron. Certe promenado sur ili devas esti tre laciga.

Eble pro la ŝtoneco de la vojoj ankaŭ ne ekzistas multaj bicikloj en Dalmacio. Entute oni trovas nur malmultajn veturilojn; ankaŭ ĉevaloj estas malofte. En Split mi vidis multajn azenojn, kiuj bone taŭgas por la regiono. Sur la ĉefaj ŝosoj kompreneble oni vidas diversajn veturilojn, eĉ aŭtomobilojn, kvankam certe ne tiom kiom ĉe ni en Rejnlando, kie oni preskaŭ ne povas plu piediri sur ŝoseo pro aŭtomobiloj. En Dubrovnik ekzistas eĉ tramo, kiu iras al la haveno Gruž. Ankaŭ kelkaj fervojaj linioj ekzistas en Dalmacio; sed ili bezonas ankoraŭ multe da perfektigo.

La ŝtoneco de la regiono donas al ĝi ankaŭ trajton de melankolio. En Split mi sentis tion eĉ pli ol en Dubrovnik.

Kiom gajaj estas la serena suno, la mirige klara ĉielo, la blua maro, la blankaj domoj, la graciaj preĝejo-turoj, la ŝipetoj kaj boatoj luliĝantaj sur la ondoj, la homoj mem, belaj kaj sanaj infanoj de sunplena lando, — la blankaj rokoj, tute nudaj aŭ portantaj nur malriĉan vegetaĵon, eĉ la verdaĵo, la cipresoj, pinoj kaj olivarboj, povas ŝanĝi la humoron je funebro kaj pensigi pri morto kaj alia mondo.

Senkompara estas en tiu rilato la tombejo de Split. Ĝi kuŝas sur duoninsulo en la ondoj. Senfina ŝajnas la maro antaŭ ĝi, kaj senfina la ĉielo super ĝi. Kaj la malhelaj funebraj arboj en ĝi, kaj la nudaj rokoj en malproksima fundo — vere, oni ne povus deziri al si pli konvenan lokon por eterna dormado.

Ekskurso al Kotor (Cattaro).

(Sabato, 30 aŭgusto.)

Jus kiam mi estas skribanta tiujn liniojn, la ŝipo eniras „Bocche di Cattaro" — la mondfaman Golfon de Kotor. Tial mi provizore interrompas mian raporton por pli bone atenti la belegan pejzaĝon.

Ĝis nun ne estis multo vidinda dum la veturado al Kotor; nur post la eliro el la haveno de Gruž la rigardo al duoninsulo Lapad kun verda monto Petka, al la fortikaĵoj de Dubrovnik, ĝia malgranda „Porte Cassone" (haveno Kasson) kaj al insulo Lokrum (Lacroma); poste sekvis nur maro dekstre kaj rokoj maldekstre.

Sed nun ni preterveturas maldekstre fortikaĵeton, el kies aperturoj nin salutas sudslavaj soldatoj. Super ĝi estas radiostacio. Ankaŭ dekstre en kelka distanco aperas fortikaĵo sur insuleto. Kaj antaŭ ni jam videbliĝas la potenca masaĵo de Lovčen-montego kun la zigzaga vojo al Montenegro.

Post nelonge aperas urbeto, gluiĝanta sur deklivo kaj etendiĝanta ĝis la marbordo, kun kelkaj ŝajne ruiniĝintaj fortikaĵoj kaj kun citadelo. En ĝia fundo du altaj rokaj montogigantoj aperas: unu kun longa suprodorso masa kiel hipopotamo kaj alia kun du apudaj kaj tria iom pli distanca suproj, kvazaŭ kamelo kaj dromedaro; mi ne scias, kial mi ĵus falas sur tiun zoologian komparon, pardonu! Granda griza nubo nagas super tiuj gigantoj.

Estas Castelnuovo, de jugoslavoj nomata Hercegnovi. Jam de malproksime salutas ĝiaj hoteloj, vilaoj kaj palmoj.

Ni haltas apud la granda molo, sur kiu multaj homoj atendis la alvenon de la „Zagreb". Knaboj kaj viroj venas sur la ŝipon, vendas konkojn, figojn kaj bildkartojn.

Boatoj moviĝas apud nia ŝipo. Nudkorpaj junuloj remas ilin.

Dumasta velŝipeto ĵus levas la ankron. Supozeble ĝi iros fiŝkapti.

Kiom riĉa je fiŝoj estas tiu maro! Jetu peceton da frukto en la akvon, — tuj alnagos amaso da tute malgrandaj kaj da grandaj fiŝoj. Vi vidas iliajn diversajn kolorojn: ruĝajn, verdajn, multekolorajn. Tiel klara estas la akvo.

Ni haltas sufiĉe longtempe. Ni devas malŝarĝi komercaĵojn ĉi tie. Estas jam kvarono post tagmezo, kaj ankoraŭ ni haltas.

Nur post plua kvarona horo la maŝinoj ekfunkciiĝas denove. Kaj nun ni traveturas sen plua halto la belegan golfon de Kotor, jen tra mallarĝa akvovojo, jen tra bajeto, — montoj dekstre kaj maldekstre, multaj vilaĝoj, domaroj, militkonstruaĵoj ĉeborde. Kotor estis antaŭe la plej fortika milithaveno de Aŭstrio.

Vidu, la ŝipo direktiĝas rekte kontraŭ la montaro, kvazaŭ ĝi volus enpenetri ĝin! Sed jen malfermiĝas mallarĝa trapasejo.

Kaj tie maldekstre: du insuletoj en la maro, sur ĉiu staras ĉarma preĝejeto. Estas rava vidaĵo. Kaj en la fundo ĉeno da montoj.

Urbeto maldekstre: Perasto, klarigas kunpasaĝero; dekstre du vilaĝoj, unu je la piedo kaj alia sur la deklivo de monto. Oni rakontas al mi, ke tiu vilaĝo estas siatempe konstruita sur la deklivo, pro la senĉesaj atakoj de la turkoj, sed ke nun multaj domoj estas ne plu loĝataj. La monto, sur kies deklivo staras la vilaĝo, estas verda, kaj verda ŝajnas ankaŭ la maro, en kiu ĝi speguliĝas.

Denove la ŝipo direktiĝas kontraŭ la montaro. Kaj denove ĝi eniras mallarĝan akvovojon. Dekstre ankoraŭ vilaĝo kun grandeta preĝejo apud la bordo kaj kun monahejo kaj preĝejo sur deklivo. En tiu vilaĝo iu strangaforma domo altiras la atenton. Estas triobla domo, aŭ efektive tri egalaj domoj; sed la meza havas eliron al la mara flanko, la dekstra kaj maldekstra eliras al flanko deturnita de l' maro. Pri tiuj domoj ekzistas legendo: estis iam tri fratinoj, kiuj tiom malamis unu la aliajn, ke ĉiu el ili konstruigis apartan domon kun eliro al alia flanko.

Denove vilaĝo maldekstre. La akvovojo plilarĝiĝas je bajo, en kies fundo maldekstre aperas Kotor antaŭ la alta rokego Lovĉen. Oni vidas la citadelon kaj el proksimeco la serpentinojn de la ŝoseo al Montenegro.

Bedaŭrinde pro nia longa haltado en Castelnuovo ni povos resti en Kotor nur unu horon. Sed la urbeto ne prezentas eksterordajn vidindaĵojn.

Kiam ni albordiĝas, mi ĝojas vidi la bonkoran vizaĝon de samideano Vojković, kiu dum nia ekskurso al Biševo plezurigis nin per sia gitarludo. Li revenos per la sama ŝipo al Split.

En Kotor mi havis nur tempon por tagmanĝi kaj por aĉeti vinberojn kaj melonon por la posttagmezo kaj la neeviteblajn bildkartojn, bedaŭrinde ne belajn kaj parte nur malmulte similajn al la admirinda pejzaĝo, kaj jam mi devis reensipiĝi. Ilustritajn kartojn mi cetere aĉetis en preskaŭ ĉiuj urboj kaj urbetoj, kiujn mi tuŝis dum mia vojaĝo. Formante tutan kolekton, ili estos poste taŭga kaj agrabla rememorajo.

Pri la reveturo mi ne bezonas multon skribi, se ne estas pri la delfenoj, kiuj jen akompanis nian ŝipon dum mallonga tempo montrante siajn artojn en nagado kaj saltado, aŭ pri la du velŝipetoj, kiuj veturadis apude, etendante inter si retegon por kapti fiŝojn. Baldaŭ vesperiĝis, kaj la kapitano faris grandan ĉirkaŭvojon, por eviti la insulojn kaj rifojn.

Kiam la „Zagreb" albordiĝis en Gruž, tie jam atendis nia amikoj por saluti kaj — adiaŭi nin.

Ekskursoj de Dubrovnik.

Mi nun daŭrigos mian raporton pri Dubrovnik. La legantoj bonvolu senkulpigi, ke mi babilas tie ĉi iom senorde. Sed ili povas esti certaj, ke pro tio la raporto mem estas des pli fidela kaj pli viva.

Pri la situo, konstruiteco ktp. de Dubrovnik mi jam diris sufiĉe. Restas al mi priskribi mallonge, kiamaniere ni pasigis la tempon en la antikva urbeto,

La matenon de nia alveno (mardo, 26. aŭg.) s-ano Patro D-o Velnić estis nia gvidanto tra monahejoj, preĝejoj, muzeo ktp. Posttagmeze mi veturis kun s-ano Kenn kaj ges-anoj Zuber el Zagreb per remboato al insulo Lokrum (Lacroma), idilie situanta en malgranda distanco de la haveno Kasson en Dubrovnik. Vespere ni salutis la samideanojn, kiuj revenis de ekskurso al Kotor, kaj samtempe adiaŭis amikon Kenn, forveturontan al Italujo.

Merkrede mi dormis longe, pro la dumnokta turmentado per la cimoj, kiuj ĉe matenkrepusko kutimas forlasi sian viktimon kaj retiriĝi en siajn kaŝejojn. Posttagmeze mi promenis kun franca samideano Courtinat al kapelo de S-ta Vlah (Blazio), dumvoje gustumante dolĉajn figojn kreskantajn apud la vojo, kaj poste al monto Srgj, de kie ni ĝuis la sunsubiron kaj la vesperan iluminadon de la profunde kuŝanta urbo. La tagon ni finis kun aliaj gesamideanoj en bela kafejo antaŭ la muregoj de la urbo, tuj apud la maro.

Tiu kafejo estas generala renkontejo vespere. Kaj antaŭ la vicoj da tabloj kaj seĝoj estas la kutima vespera promenejo de la gedubrovnikanoj. Tie ili iras tien kaj reen, la brunhaŭtaj belulinoj, plej ofte duope, kaj same la sinjoroj; kelkfoje oni vidas ankaŭ sinjoron promenantan kune kun fraŭlino, sed plej ofte ili iras aparte. Estas simila promenejo kiel en Split apud la haveno aŭ pligrandmezure en Zagreb sur Zrinjski-trg.

Jaŭdon la vetero ne estis favora. Matene eksplodis fulmotondro, kaj ankaŭ posttagmeze la ĉielo ne aspektis kiel dalmacia ĉielo. Preskaŭ la tutan tagon mi uzis por skribi leterojn kaj raportojn. Vespere mi havis okazon aŭskulti surplacan koncerton de bona jugoslava militista orkestro (ĉ. 40 muzikistoj); tia koncerto okazas ĉiuĵaŭde.

Vendredon mi ekskursis kun s-o Courtinat al la t. n. „fontoj" de rivero Ombla. Ni iris laŭ akvokonduk ilo sur tre ŝtona kaj laciga vojo, kiu tamen rekompencis nin per belaj vidaĵoj super bordon, maron kaj insulojn kaj poste super la valon de Ombla. Sed la „fontojn" ni ne trovis. La rivero venas tuj en larĝeco de ĉ. 50 metroj el monto kaj poste larĝiĝas ĝis ĉ. 150 metroj. Supozeble ĝiaj veraj fontoj estas ie en la montaro, kaj ĝi fluas dum longa vojo sub la montoj.

La hejmvojon ni faris laŭ la alia bordo de l' rivero, poste transiris ĝin per boato kaj vespermanĝis en malgranda restoracio, t. e. nia „vespermanĝo" konsistis el granda plado da frititaj fiŝetoj, pano kaj bonega vino. Ni estis plene satigitaj kaj pagis por la tuto (por du personoj) 38 dinarojn: „30 dinarojn por la manĝo kaj 8 dinarojn por la ridetoj de la domfilino", opiniis s-ano Courtinat. Poste ni revenis Dubrovnikon.

Kaj hodiaŭ mi faris la jus priskribitan ekskurson al Kotor, dume la aliaj gesamideanoj pasigis la tempon en Dubrovnik aŭ ties ĉirkaŭaĵo. Ili forveturis per la sama ŝipo, per kiu mi revenis de Kotor, unue al Split kaj de tie hejmen. Estis la du simpatiaj belginoj, la franco s-o Courtinat, en kies akompano mi faris diversajn ekskursojn, kaj sudslava samideano kun hungara fraŭlino, kiu partoprenis la kongreson en Split sed ankoraŭ ne scipovas Esperanton.

Bonan vojaĝon, karaj geamikoj, kaj ĝojigan revidon okaze de la venonta kongreso!

Sonĝo sub palmo.

Ĉiuj nun foriris, kaj mi restis sola.

De Split al Dubrovnik ni estis ankoraŭ eta aro; poste unu post alia foriris, kaj hieraŭ vespere ankaŭ la resto forlasis min.

Mi sidas en la ombro de palmo, proksime al la maro, kaj rigardas la vastaĵon.

Serena posttagmeza sunbrilo kuŝas sur la maro. La radioj tuŝas la akvon jam ion oblikve. Tamen ili estas ankoraŭ tre fortaj. Mil kaj mil ondetoj fajreras, kvazaŭ amaso da ormonheretoj dancus super ili.

Tiom da riĉaĵo; sed ĝi estas ne kaptebla!

Kaj tie malproksime ĉe la horizonto aperas blankaj veloj. Gaje la ŝipetoj balancigas sur la ondoj, kvazaŭ ili portus feliĉajn animojn.

Tiom da feliĉo, jes; sed ĝi estas ne atingebla! Ĝi fornaĝas, Dio scias kien.

Kaj ĉi tie mi sidas — sola.

Kiom valoras por mi tiu senfina beleco, tiu adorinda grandiozeco de la naturo, se mi devas sola ĝui ĝin, se ne estas homoj, kiuj partoprenas en la neesprimebla j sentoj de mia animo?

Mi malgajas.

Mi sentas tion, kion devas senti ekzilito el la patrujo, kiu estas devigata vagadi malproksime, malproksime de la hejmo kaj de la amataj, sen la certeco reveni. Mi ne estas ekzilito. Libervole mi restis ĉi tie; ĉar mi opiniis, ke estas iro bele tie ĉi. Mi revenos hejmen, certe mi revenos. Kaj tamen, tiu sento de soleco estas maldolĉa.

Lastnokte mi sonĝis pri ĉarma knabino iam renkontita en la vasta mondo. Kial mi sonĝis ĝuste pri ŝi? Ŝi ne logas en mia hejmlando, ŝi logas ankaŭ malproksime, malproksime. Ĉu ŝin mi kupidas? Ŝi estas neatingebla por mi, neatingebla kiel tiuj fajrerantaj ormonheretoj sur la ondoj, neatingebla kiel tiuj blankaj veloj jam malaperontaj post la horizonto. Ŝi estas tiu feino, mia pado de tiu Granda Feliĉo, pri kiu revas ĉiuj homoj ĝis sur la mortolito kaj kiu ja neniam venos.

Tamen estas tiel bele, sonĝi pri ĝi, eĉ en la konscio, ke ĝi restos nur sonĝo.

Nubo ŝovis sin antaŭ la sunon. La fajrerantaj ormonere oj sur la ondoj dronis en ĝia ombro. Ankaŭ la blankaj veloj ĉe la horizonto estas malaperintaj. Ĉu plendi? Ĉu funebri pri tio, kio pasis?

Hojho', prenu la vivon, kia ĝi estas! Ekhavu novan kuraĝon por almiliti la mondon! Ekhavu freŝajn fortojn por batali la batalon de l' vivo! Daŭrigu sekvi la postsignojn de l' feliĉo! La milito, la batalo, la ĉaso jam estas parto de tiu feliĉo, kiu mem ne estas atingebla. Eble la sonĝo, la sopiro estas la pli valora parto de la feliĉo, ne la atingo mem.

Vidu en spirito la ormonheretojn, la blankajn velojn, la sorĉan rideton de ĉarma knabino! Certe, nun kovras nubo la sunon, horizonto kaŝas la blankajn velojn, granda distanco disigas vin de la sorĉa rideto de via feino. Sed tio ne detenu vin, plu batali, plu serĉi, plu ĉasi la feliĉon!

Kaj se ĉe la fino staras lu kun falĉilo en la brako — ne timu lin, provu superi lin! Batalu, ĉasu, sopiru — kaj vi estos senmorta!

Nubo forŝoviĝas, ormonheretoj fajreras denove, aliaj veloj aperas ĉe la horizonto.

Ne provu teni, kio pasis! Ĝuu la estantan kaj preparu la estontan tempon! Aŭ pensu por momento nenion! Ripozu! Dolĉe estas ripozi sur la bordo de l' maro kaj aŭskulti la mallaŭtan melodion de l' ondetoj. „Esperu", ili kantas, „kaj batalu!"

Mi fermas la okulojn, ekdormetas.

En sonĝo aperas du klaraj steloj — okuloj de mia feino; kaj sunradio — ĉarma rideto promesanta serenan feliĉon; kaj mano premas manon, kaj koro batas kontraŭ koron — —

Mi vekiĝas.

Nenio.

Mi estas sola.

Krepuskas. Ormonheretoj perdiĝis en ondoj. Veloj malaperis denove. Suno dronis post montoj. Ĉielo kaj maro ruĝiĝas.

Tie, sur la supro de l' roko — ĉu vi vidas la virgan silueton de knabina figuro?

Kvazaŭ monumento de beleco! Kiel ŝi etendas la brakojn renkonte al la maro en naive-rava gesto, kvazaŭ ŝi volus ĉirkaŭpreni ĝin! Ŝia hararo flirtas en vespera venteto. Tute klare desegniĝas ŝia gracia korpo sur la horizonto.

Ho feliĉo, feliĉo!

Kaj mi estas sola en fremda lando.

Tute sola. —

Adiaŭo de Dalmacio.

La lingvoj en Dalmacio. — Evitebla eraroj. — La venezia karaktero de la urboj. — Konsiloj al dalmacianoj. — Prokrastita ekskurso. — La tero fariĝas ĉiutage pli malgranda. — Adiaŭ, Dalmacio!

La loĝantaro de Dalmacio estas nepre sudslava; oni aŭdas inter la enlandanoj mem preskaŭ nur la kroatan lingvon. Tamen granda parto, precipe la hotelanoj, oficistoj kaj komercistoj, komprenas kaj parolas germane kaj itale. Krom tio la inteligentularo scias ankaŭ interkompreniĝi per la franco lingvo. Oni do povas diri, ke la plej valora parto de la loĝantaro scipovas lingvojn de tri diversaj karakteroj: de l' slava, ĝermana kaj romana.

Mi rememoras, ke iuvespere en Split — estis dum la amuza vespero — mi, la germano, parolis tre multe france kun neesperantistaj loĝantoj de Split, kiuj ne komprenis germane, kaj sinjoro Courtinat, la franco, parolis germane kun loĝantoj ne komprenantaj france. Espereble tiuj loĝantoj nun lernos Esperanton.

Malgraŭ la multlingveco de la dalmacianoj estas mirige, ke ili atentas malmulte pri korekteco en presajoj. Mi vidis afiŝojn, reklamilojn ktp. en diversaj lingvoj, en kiuj svarmis gramatikaj kaj pres-eraroj, eĉ tiom, ke ili parte estis nekompreneblaj. Ĉu oni ne povus montri la presprovaĵojn al kompetentuloj, antaŭ ol naskigi tiajn abortojn? Mi nomas nur la reklamilojn de la groto en Gruž, kiuj estas veraj monstroj en tiu rilato.

Interese estas, ke malgraŭ la slaveco de la popolo la slavaj nomoj de la urboj kc. estas preskaŭ nekonataj en eksterlando. Spalato, Ragusa, Cattaro, Lissa kaj Lesina konas ĉiu iom instruita homo; sed Split, Dubrovnik, Kotor, Vis kaj Hvar provizore estas enigmoj por li La kaŭzo estas en tio, ke la urboj grandparte estas kolonioj de venezianoj, kiuj kompreneble donis al ili italajn nomojn; pro tio ankaŭ la arkitekturo de la urboj, de ĝiaj preĝejoj kaj palacoj estas ĉefe venezia, eĉ multaj kutimoj de la loĝantaro montras venezian karakteron. La interno de kelkaj preĝejoj kaj palacoj, ekzemple en Sibenik, en Split, en Trogir, en Hvar kaj en Dubrovnik, estas vere klasika kaj surprize bela.

Je ĉi tiu loko mi volas ankaŭ atentigi pri la cirilaj surskribo j sur kelkaj afiŝoj kaj reklamŝildoj de dalmaciaj urboj. Ŝajne la serboj enkondukis ilin. Sed la cirila literaro tute ne harmonias kun la karaktero de Dalmacio; ĝi estas fremdaĵo transplantita en nekonvenan teron. La cirilaj literoj ŝajnis al mi kvazaŭ vangfrapoj al dalmacia kulturo.

Laŭ diro de sudslavaj samideanoj la vizito de eksterlandaj esperantistoj estis tre valora por la enlanda movado. En Split kaj ankaŭ en Dubrovnik la gazetoj raportis pri nia vizito.

Mi devas konfesi, ke mi neniel pentas esti veninta al Dalmacio, kaj mi deziras, ke multaj samideanoj estu per mia raporto instigataj, ankaŭ direkti siajn paŝojn foje al tiu ĉarma lando aŭ instigi aliajn personojn viziti ĝin. Ili eĉ ne havos penon, trovi taŭgajn hoteloj n, ĉar mi jam nomis kelkajn; ili do ne suferos pro cimoj, kiel mi, al kiu la taŭgaj hoteloj ankoraŭ ne estis konataj.

Al Dalmacianoj mi povas nur konsili, ke ili unuflanke klopodu altiri ankoraŭ pli multe da fremduloj al nia lando kaj aliflanke ankoraŭ pliperfektigu la porfremdulajn aranĝon; plue ke ili lernu Espe anton, por ke la fremduloj, kiuj scipovas Esperanton, sentu sin kiel eble plej hejme en ilia lando.

Mi devas konfesi, ke la dalmaciaj samideanoj, en Dubrovnik ekz. D-o Velnić kaj s-o Monić, laŭeble klopodis pri ni; tamen la movado povus esti pli forta.

— Nun mi jam preparas min por foriro. Italujo estas mia proksima celo. Poste mi revenos tra Svislando al mia hejmo.

Oni konsilis al mi, ekskursi de ĉi tie al Sarajevo, la ĉefurbo de Bosnio, nun ankaŭ formanta parton de Jugoslavio, por tie konatiĝi kun la orienta kulturo. La loĝantaro de tiu urbo, kvankam sudslava laŭ raso, havas la mahometanan religion. Oni eĉ diris, ke en Sarajevo ne ekzistas malpuraj hoteloj, ĉar malpureco estas tie severe punata. Sed la vojaĝo tien estas tre peniga. Oni devus veturi minimume 15 horojn per iom primitiva fervojo, kaj oni bezonus same tiom da tempo por reveni.

Do mi rezignas provizore; ĉar mi devos ankoraŭ digesti multajn interesindaĵojn vidotajn dum mia vojaĝo tra klasika Italujo. Jam nun la impreso j estas preskaŭ tro multaj. Cetere mi jam konatiĝis iom kun la oriento en Budapest. Krome mi estis kelkan tempon en akompano de orientulo — s-ano Kenn. Tio sufiĉas al mi por la momento.

Mi tamen esperas, ke en postaj jaroj mi sukcesos vidi veran orienton — ĉu en Bosnio, ĉu en Turkujo mem, ĉu eĉ pli malproksime, eble en Hindujo. Kiu scias? La tero fariĝas ĉiutage pli malgranda, dank' al aeroplanoj, radiotelefono kaj — Esperanto. Do, ni esperu kaj fidu la estontecon, kies pioniroj ni ja volas esti!

Jugoslavio donis al mi sufiĉe en tiuj kelkaj tagoj, pro tio mi elkore dankas al ĝi kaj al ĝiaj loĝantoj, precipe al la afablaj gesamideanoj.

Adiaŭ do, vi bela lando de l' suno kaj maro kaj de mil insuloj! Mi nun veturos al alia lando de suno kaj maro, sed nur, por kvazaŭ fluge trarapidi ĝin; ĉar mia tempo kaj mia — monujo urĝas.

Adiaŭ, Dalmacio, kaj — ĝis revido! *Teo Jung.*

Kunveno de inĝenieroj dum la Deksesa.

Dum la Deksesa ankaŭ kunvenis inĝenieroj sub la prezido de D-o Hanauer-Berlin. Oni priparolis ĉefe la kreadon de teknikaj vortaroj. Oni sciigis, ke kelkaj volumoj de ITW-vortaro (Eldonejo Oldenburg) estas finigitaj. La valoraj preparoj daŭradas. Fakaj kunlaboremuloj turnu sin al la prezidinto de la kunveno.

Pri la kunsido detale informas volonte per cirkulero: D-o J. Hanauer, Kaiserin Augusta Allee 37, III, Charlottenburg-Berlin.

Vegetara Ligo Esperantista.

Faka kunsido en Wien, la 12. 8. 1924, 9 h.

La kunsidon prezidis s-ino Julia Isbrücker el Hago; protokolis s-o Petr Mitkov el Pleven, Bulgarujo. La prezidantino legis raporton de la ĝenerala sekr.-kas. Bünemann, kiu pro ripozbezono ne povis ĉeesti, kaj raportis pri la vegetara movado en la tuta mondo.

Poste s-ino Isbrücker raportis pri la disvastiĝo de vegetarismo en Nederlando, kaj s-o Mitkov raportis pri la vegetara movado en Bulgarujo. Poste donis sian malgrandan raporton D-o Fr. S. Onderdonk.

La kunsido aklame reelektis la estraron de la V.L.E.

S-o Mitkov opiniis, ke estus pli bone, se la bulteno „Vegetarano" aperus ĉiumonate anstataŭ kvaronjare, kaj oni decidis, lasi tion ĉi al la redaktanto de la bulteno.

Oni esprimis la deziron, ke Esperanto fariĝu ne nur permesata lingvo de la Internacia Vegetara Unuiĝo (kies anoj estas la naciaj veg. societoj) sed ĝia ĉefa oficiala lingvo. Kun plezuro oni konstatis, ke la sekretariino kaj la kasisto de tiu unuiĝo jam lernis Esperanton. —

Pro tio, ke de nun la societa jaro de la V.L.E. estos la kalendara jaro, la unua numero de la nova jarkolekto de „Vegetarano" aperos en januaro 1925, anstataŭ oktobro 1924. Ekstra numero de la nuna societa jaro en oktobro pro financa motivo ne povos aperi.

Ĝen. Sekr.-Kasisto *Bünemann.*